



LA INFORMILO

INFORMBULTENO PRI ESPERANTO

BULLETIN BILINGUE D'INFORMATION SUR L'ESPERANTO

ELDONISTO : esperanto-federacio de ORIENTA FRANCO

Editeur: Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto
Maison des Jeunes et de la Culture
27, rue de la République, 54000 NANCY -F-
PCK - CCP: 1997-72 W NANCY

trimestriel
Nouvelle série

N° 10
2ème trimestre 1975



abonnement

Un an : 6F

1e N°: 1,50 F
(1 jaro: 6 FF aŭ 6 in-
ternaciaj kuponoj)

NTO★FLASH... ESPERANTO★FLASH... ESPERANTO★FL

UNE DATE DANS L'EDITION ESPERANTISTE: LA PARUTION DE L'OEUVRE ENCYCLOPEDIQUE

"*ESPERANTO EN PERSPEKTIVO*". Cet ouvrage unique qui porte en sous-titre "Faits et Analyses concernant la langue internationale", est sans doute un des plus beaux fleurons de la littérature espérantiste des dix dernières années. Véritable bible du mouvement espérantophone mondial, ce magnifique volume retrace toute l'histoire de la langue, dresse un panorama exhaustif de sa situation actuelle dans le monde et envisage son essor futur.

Elaboré avec une rigueur toute scientifique, cet ouvrage sera "le compagnon idéal des études espérantistes". On ne peut que souhaiter sa traduction dans les grandes langues véhiculaires d'aujourd'hui.

L'ESPERANTO A L'UNIVERSITE: Après Clermont-Ferrand, Aix-en-Provence et Pau, voici qu'un nouveau cours d'espéranto est dispensé à des étudiants de l'INSTITUT NATIONAL des SCIENCES APPLIQUEES à RENNES, sous la direction de M. MARTIN, Professeur agrégé d'anglais.

UNE INNOVATION JAPONAISE: Un service téléphonique en espéranto!... Le n° 371-5644 de l'annuaire de Tokio donne, entre 21h et 9h du matin, les dernières nouvelles du monde espérantophone. Chaque auditeur qui commence l'apprentissage de la langue, peut également soigner sa prononciation en écoutant la voix d'espérantistes étrangers.

L'ASSOCIATION ESPERANTISTE PORTUGAISE a nouveau en activité.

Interdite pendant des décennies, l'activité des espérantistes connaît un nouvel essor. C'est ainsi que nous apprenons que le 1er Congrès Espérantiste Portugais aura lieu du 7 au 10 juin 1975 à BRAGA, dans le nord du pays.

DU THEATRE EN ESPERANTO AU CONGRES DE COPENHAGUE: On connaît déjà deux pièces qui seront présentées au Congrès Universel du 26 juillet. L'actrice polonaise Jadwiga Gibczynska jouera le rôle de Marie Curie dans une dramatique à un personnage et le théâtre espérantiste bulgare interprétera "Le serviteur de deux maîtres" de Goldoni.

DERNIERES STATISTIQUES SUR LE CONGRES UNIVERSEL DE COPENHAGUE (26/7-2/8)

A la date du 28 février on comptait déjà 764 inscriptions émanant de 42 pays. Suédois, Hollandais, Allemands et Français sont les plus nombreux participants derrière les Danois. Rappelons que le Congrès Universel 1976 se tiendra à ATHENES.

LES EMISSIONS EN ESPERANTO DE RADIO-VARSOVIE TRES ECOUTEES.

Le service de presse du département espéranto de la radio polonaise a reçu en 1974, 3021 lettres de ses auditeurs. Ce nombre ne contient pas les nombreuses missives reçues par la station à l'occasion de son Concours International Annuel.

UNE NOUVELLE REVUE MENSUELLE, GRAND FORMAT, EN COULEURS... ET EN ESPERANTO!

C'est celle nouvellement éditée par l'agence d'information bulgare SOFIA-PRESS. Par ailleurs, la Chine Populaire continue la diffusion à grande échelle de la revue "El Popola Ĉinio", qui publie de grands reportages sur les réalisations actuelles en cours dans ce pays.

UNE NOUVELLE RUE ZAMENHOF EN FRANCE.

A l'occasion du Congrès National d'Espéranto (28-31 mars 1975), une rue du Docteur ZAMENHOF, créateur de la Langue Internationale, a été inaugurée à TOURS, en présence des autorités de la ville et des 195 participants au Congrès.

A L'ATTENTION DES VILLES JUMEELES.

Nous apprenons qu'à l'issue du jumelage de TRIESTE (Italie) et de GRAZ (Autriche), les deux groupes espérantistes ont décidé une action commune au sein du Comité de Jumelage. L'utilisation de l'espéranto est incontestablement la solution la plus pratique et la plus simple pour rendre effectifs des contacts personnels nombreux. C'est dans cette optique qu'un cours public d'espéranto s'est également ouvert à BAR-le-DUC (55), ville prochainement jumelée avec GRIESHEIM (RFA), où un autre cours d'espéranto est à la veille d'être donné.

UN NOUVEAU RESTAURANT "ESPERANTO".

Il accueille désormais les espérantistes de la région de PADERBORN (RFA) A l'enseigne de "ESPERANTO-BARELETO" (Le Tonneau... Espéranto!) Il vient d'être inauguré en présence d'un grand nombre de journalistes et de la télévision allemande! Un café "ESPERANTO" vient également d'ouvrir ses portes en Pologne, au milieu d'une grande forêt qui devient chaque été le but de promenade des habitants de ZARKI et de ses environs. Mentionnons l'existence d'une autre auberge "ESPERANTO" à SCZECIN, également en Pologne... et les espérantophones qui se rendent sur la Costa Brava ne manqueront pas de déguster une excellente paëlla au restaurant ESPERANTO, sur la route de Tarragone!

LES ESPERANTISTES DE L'EST DE LA FRANCE se sont réunis à STAFFELFELDEN.

L'auberge de Jeunesse de la petite cité alsacienne a réuni une cinquantaine de participants, lesquels ont assisté à une soirée culturelle au cours de laquelle un espérantiste allemand a traité de l'oeuvre du Docteur Zamenhof en général et des "Proverbes en Espéranto" en particulier. Un vin d'honneur offert en présence du Directeur de la MJC et du maire de Staffelfelden a permis de dresser un bilan satisfaisant des activités de la Fédération au cours de l'année écoulée.

— l'homme moderne parle deux langues
celle de son pays et l'ESPERANTO —

EL NIA FEDERACIA KONGRESO

raportas Roger DEGRELLE

Nia ĉi-jara kongreso okazis en la afable akceptema Junuldomo, kiu amikece estras S-r^o TARANTOLA. Partoprenis ĉirkaŭ 45 paersonoj. Tri partoj konsistigis la kongreson.

Unua Parto: KULTURO.

S-r^o Reinhard HAUPENTHAL, el Sarlando, longe, funde, trafe prelegis ĝenerale pri la Zamenhofa Verkaro kaj aparte pri la Proverbaro Esperanta. Bonega prelego, atenta aŭskulto, atingita celo!

S-r^o GROSSMANN prezentis admirindajn kaj lernigajn diapozitivojn pri Japanio.

Dua Parto: LABORO.

En la nomo de la Mulhauzaj samideanoj, S-r^o LIENHARDT salutas la kongresanojn donante poste la parolon al S-r^o COLNOT, kiu malfermas la kongreson, dezirante al ĉiuj bonvenon kaj legante salutleterojn de S-rino GRAMP el Strasburgo, S-r^o RADAM el Manĥejmo F-ino NOURMONT, sekretariino de UFE, S-r^o HEISS el Oberkirch, S-r^o ODENT, prezidanto de la Norda Federacio, S-r^o MANCEAU, nun loĝanta en Charente, S-r^o HABERMEHL, honora prezidanto de la Strasburga Grupo kaj fine de F-ino HETER, sekretariino de la Federacio de la Centra Montaro.

La Prezidanto ekstudas la agadraporton de la jaro 73/74, kiu aperis en la antaŭa "Informilo": unuanime aprobita. Li aldonas kelkajn suplementaĵojn: 112 membroj en 1974; ni gajnis 25, perdis 24. Do unu membro plie! Aprobita, sed 1 sindeteno. Abonantoj al la "Informilo": 108; pasintjare 98. Perkorespondaj lernantoj: 54 novaj por la unua grado, nur kelkaj por la dua pro la manko da libroj.

Pa. laj kursoj:	BAR-le-DUC	40 lernantoj en 2 kursoj (publike kaj lerneja)
	NANCY	9 lernantoj en 2 kursoj
	SAINT-DIE	9 lernantoj en duagrada kurso.

Respondante al S-in^o TRIOLLE, la Prezidanto precizigas, ke ĉiuj anoj de la Federacio estas anoj de UFE.

Pri la financa raporto bonvolu legi en la antaŭa "Informilo": bona kaslibro, bona kasisto, fida renoviĝo. Tamen pro la nacia leĝaro la Federacio bezonus du kontrol-komisarojn: farende, kompreneble! Aldona raporto: la nuna raporto ne tute montris, ke la profito estas kontentiga, sed estas konsiderinde ke la "Informilo" devas aperi ankoraŭ trifoje ĉijare. Tiu profito devenas el la malavaraĵoj kaj el abonantoj, kiuj kompletigis la abonpagon ĝis 10 FF. S-r^o LIENHARDT sciigas, ke S-in^o KITZ proponas libron, kies pagduono estos donita al la Federacio. Nia bulteno, bonege redaktita de S-r^o DENIS, kiu prizorgas la elekton de la artikoloj kaj la aperigon, estas sendita nur al la abonantoj pro la deficito. Se la afero daŭros, la tarifo kreskos: la asembleo unuanime aprobas la principon de eventuala tarifpligrandigo, eĉ dum la jaro se necesas.

El la grupoj.

BAR-le-DUC: la membroj fidele ĉeestas la monatan kunvenon. Oni legu pri la kursoj ĉi-supre.

EPINAL: nenia sukceso.

MULHOUSE: ĉiumonate la kunveno, sed... la domo, en kiu ĝi okazis, estis detruita. Felice la Konsistorio de la Reunuiĝintaj Eklezioj en Elsaco-Loreno pruntedonis kunvenojon. Krom tio la kontaktita ĵurnalisto promesis helpi por aperi pliajn artikolojn pri esperanto kaj instigi homojn al ties lernado.

NANCIO: bonvolu legi la apartan raporton.

STRASBOURG: iomeste por diri; ĉiumonata kunveno; 30 pagintaj membroj sed 5 aŭ 6 aktivuloj. Belega biblioteko en la laika centro sed bedaŭrinde ne multe uzata de la novaj kaj eĉ de la malnovaj esperantistoj. Duagrada kurso finiĝis pro manko da kursanoj.

SAINT-DIE: 9 plenkreskuloj kaj junaj lernantpaj konsistigas la grupon. Oni provis la Asimil-metodon sed malprave: tro malfacila metodo por ili. Oni returnis al "l'esperanto vivant" kaj oni ĝojis konatiĝi kun du amikoj el Friedrichshafen.

Kaj nun la baloto por la renoviĝo de la komitato. Estis reelekteblaj: F-in^o JACQUOT

S-roj CHAPELLIER, GROSSMANN, BARIDO. La lasta ne plu kandidatiĝis. Aliaj estas petataj sin prezenti. Junulo, gratulon al li, prezentas sian bonvolemon; sed tro juna, rigardante la francan leĝon. Kiam okazos la 16-jara majoritato? S-r° DEGRELLE estas proponita kaj elektita. Tutsame por F-in° JACQUOT, S-roj CHAPELLIER kaj GROSSMANN.

Do la kongreso povis pritrakti tuj poste la naciajn problemojn. S-r° DURAND asertas, ke la agdraporto ne estas sufiĉe klara kaj rimarkigas la rezignon de kelkaj komitataj. S-r° LIENHARDT petas, ke ni devus ekzameni la situacion resumon fare de UEA kaj UFE de post la Hamburga kongreso antaŭ ol studi alian punkton. F-in° TRIOLLE memorigas, ke la komitato estas farinta proponon, kiu ne estis akceptita de la nacia konsilantaro kaj do ĝi rezignis. Sed oni ne estus povinta paroli longatempe pri tio kaj la prezidanto proponis baloton por demandi, ĉu la kongreso daŭrigas la diskuton aŭ balotas la naciajn raportojn. La plimulto deziras baloti. Do...

BALOTADO pri AGAD-RAPORTO: aprobita de 21 personoj;

FINANCA RAPORTO: aprobita de 24 personoj.

ELEKTO de la konsilantoj; S-r° CHAPELLIER estos nia delegito en TOURS. Ĉiuj rezultaj voĉdonadoj estos transdonitaj al UFE.

DIVERSAĴOJ: S-r° COLNOT petas, ke la ebleco modifi la statutojn estu studita, ĉar iuj membroj forlasis la federacion pro tio, ke ili ne povas aniĝi al la federacio samtempe esti NE membro de UFE kaj UEA. F-in° TRIOLLE rimarkigas, ke tiaj modifoj malfortigus la nacian asocion; kontraŭe la federacio devas fortigi la nacian. S-r° LIENHARDT aldiras, ke estus pozitive, se la Federacio Aliĝos la nacian. Konklude jen la propono studota:

...lasi al ĉiu membro la eblecon elekti inter esti...

Aŭ membro nur de la Federacio

Aŭ membro de la Federacio kaj de UFE

Aŭ membro de la Federacio, de UFE kaj de UEA.

S-r° CUENE memorigas, ke eblas aniĝi al UEA sen devigo aniĝi al la Federacio kaj al UFE. Li forlasis UFE kaj UEA; sed en la nuna formo, li ne plu povas partopreni en la Federacio. S-r° ZIPFEL deklaras, ke oni povas lasi niajn statutojn neŝanĝitaj kaj atendi la labor-rezultojn de la nova komitato de UEA.

Por la studo de la projekto: JES 12 voĉoj

NE 1 voĉo

La kongreso proponas, ke UFE enketu ĉe la parlamentanoj, kiel estis farite en Belgio.

S-r° ZIPFEL informas pri senpaga broŝuro al ĉiuj deputitoj fare de la itala asocio. Tiu broŝuro estas disponebla ĉe R.A.I. viale Mazzini, 00195 ROMA.

La konsilantaro de UFE prezentas tri rezoluciojn:

- a/ ke estu respektata absoluta neŭtraleco

- b/ komdamnas ĉiujn kalumniajn kampanjojn de kie ajn ili venas, ĉar ne dignas el esperantistoj.

- c/ proponas al D-r° LAPENNA iĝi Honora Prezidanto de u.f.e.

Voĉdonado: (A) kaj (B) jes 9 — ne 0

(C) jes 6 — ne 3 ... "ĉar li rifuzis iĝi Honora Prezidanto de UEA"

Honor-vino kaj parolado de la Prezidanto en la ĉeesto de la urbestro de STAFFELFELDEN kaj de la respondeculo de la Junuldomo, S-r° TARANTOLA.

... Post tiuj-ĉi longaj kaj diversaj diskutoj oni rapidis al la restoracio por agrable tagmanĝi.

Kaj ... fine la fino!...

TRIA PARTO: la nova komitato kunvenas por elekti sian estraron:

Prezidanto: S-r° J.P. COLNOT - 15, rue de Lavaux - 54520 LAXOU

Vic-Prezidanto: S-r° Albert LIENHARDT - 24, av. de Riedisheim - 68100- MOLHOUSE

1a Sekretario: S-r° Roger DEGRELLE - 11 cours Leopold - 54042 NANCY CEDEX
2a Sekretariino: F-in° Anna JACQUOT - Vallon St-Antoine - CHANTRAINE - 88000 EPINAL
Redaktoro de "La Informilo" - S-r° Pol DENIS - 5 chemin de blamecourt - 55000 BAR-le-DUC
Kasisto: S-r° André GROSSMANN - Bât. D2 - rue de la Doller - 68110 ILLZACH
Help-kasisto: S-r° Jean CHAPELLIER - 11 rue de Bretagne - 57160 - MOULIN LES METZ
Membroj: S-roj BERGEROT Marcel - 22 rue Varroy Chantraine - 88000 - EPINAL
CUENE Marcel - 59 rue des trois châteaux - 68000 - COLMAR
DURAND Robert - 3, groupe Ellen - Chantraine - 88000 - EPINAL
D-r° VOLTZ Jean - 16 rue Antoine Hurault - 88000 - EPINAL
Sr° ZIPFEL Frédéric - 20 rue Labroque - 67000 - STRASBOURG

el nia nacio kongreso

195 partoprenintoj inter kiuj 12 eksterlandanoj kunvenis en la urbodomo, kie la unua Adjunkto akceptis ilin kaj honorigis ilin per vino kaj kukoj. Li longe parolis pri la historio kaj la neceso de esperanto. Respondis al li S-r° Hervé GONIN, kiu laŭdis la belan urbon de TOURS kaj ties regionon kaj aludis la famulojn iam tie-ĉi vivintaj.

Profesoro Gaston WARINGHIEN parolis ĉe la inaŭguro de la strato Zamenhof.

Debato okazis pri UEA sub la prezido de F. GARRIGUE kaj D-r° DENOEL.

La du ĉefaj-n kunvenojn prezidis S-r° P. BABIN

Sabate vespere okazis folkloro spektaklo kaj post la fermo de la kongreso, dimanĉe vespere, 105 personoj ĝuis rimarkindan bankedon en profunda kelo, enhakita en la rokoj iom ekster la urbo.

London, sub bela suno, du plenplenaj aŭtobusoj ekskursis suden de la urbo, okaze de vizitoj de antikvaj preĝejoj kaj kasteloj kaj ĝuante bonegan kampanon manĝon kun la lokaj vinoj.

La kongresanoj estas tre dankaj al S-r° AUDE, kiu helpe de 5 aliaj personoj, organizis la kongreson.

Nun jen la nova estraro de UFE:

Prezidanto: S-r° Hervé GONIN

Vic-Prezidantoj: S-in° J. VINCENT, S-roj R. DESPINAY, LE MAGADURE kaj J. GUILLAUME

Generala Sekretariino: F-ino Claude NOURMONT

Kasisto: Jack ROUSSEAU.

el sciigoj de S-r° GUILLAUME

POR PROGRESIGI VIAJN LINGVOKONOJN ĈESTU NIAJN KULTURAJN SEMAJNFINOJN!

A KULTURA SEMAJNFINO EN BAZELO.

raportas A. GROSSMANN

La 19an kaj la 20an de oktobro okazis en Bazelo la 8a kultura semajnfino, kun samtempa disvolviĝo de 4 programoj: por esperantistoj, gelemantoj, komencantoj kaj infanoj. Ĉar malmulte da samideanoj el nia Federacio profitis por partopreni ĉi-tium eksterordinaran aranĝon, mi deziras fari mallongan raporton pri ĝi.

Proksimume 40 personoj plenigis la salonon modernan en la lernejo Bläsi. S-r° Ed. BORSBOOM el Nederlando prezentis en serio da ses tri-kvaronhoraj prelegoj portreton de Eugène LANTI, emininta Esperantisto kaj originala pensulo.

Ni aparte povis taksi la kompetecon de la preleganto, kiu estas la aŭtoro de aperonta biografio de la fondinto de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda). Tial li faris plurajn vojaĝojn por sekvi la spurojn de LANTI kaj por akiri biografiajn detalojn.

S-r° Borsboom sciis kapti la atenton de la aŭskultantoj pritraktante ne nur super-rigardon pri la vivo de Lanti (1879 - 1947), sed ankaŭ lian lingvan stilon kaj ideologian evoluon. Li ankaŭ faris skizon pri la historio de SAT, al kiu Lanti grandparte

estis ligita, kaj kies fondinto li estis.

La sabatan vesperon ni povis aŭskulti lertajn muzikaĵojn de la ensemblo Kurt Schweizer. Poste sekvis prezentado pri la arto de Van GOGH per lumbildoj kaj klarigoj farita de S-in^o Martine SCHNELLER.

Estus dezirinde, ke multaj Esperantistoj partoprenu tiajn kulturajn aranĝojn aparte allogaj pro la enhavo. Mi aŭdis, ke tia kultura semajnfino en Bazelo fariĝos ĉiu-jara aranĝo okazonta en oktobro.

Do, ĝis oktobro 1975 en Bazelo!

ⓑ 4-a KULTURA SEMAJNFINO de la SARLANDA ESPERANTO-LIGO raportas J.L. VANOLA

Tiu kultura evento okazis la 19an kaj la 20an de oktobro 1974 en la modernega junulargastejo de SAARBRUCKEN. Proksimume 40 geesperantistoj el Germanujo, Luksemburgio kaj Francujo partoprenis ĉi-tiun agrablan kunvenon. Sabaton ni partoprenis post la manĝo Gojan Vesperon! Tie fluis multe da biero kaj la etoso estis tre varma. Niaj esperantistaj amikoj estis organizintaj tombolon, kiu ravis ĉiujn partoprenantojn.

Dimanĉon matene, ni aŭskultis prelegon pri la romano "Infanoj en Toronto" de la verkisto Stellan Engholm kaj pri ceteraj verkoj. Tiu prelego devus esti tre interesa sed ĝi okazis germanlingve kaj mi nenion komprenis.

Poste la partoprenantoj aŭskultis Doktoron Max Mangold, kiu majstre pritraktis la temon "Esperanto kaj ties facileco rilate la ĉefajn kulturlingvojn". Sekvis debatoj. Tiu prelego okazis en la Pedagogia Altlernejo.

Bonega tagmanĝo sekvis. Poste, ve, mi devis forlasi la kunvenejon sed mi konservos bonegan memoron de tiu interesa semajnfino.

N I A V I V O E N . . .

NANCY - parolaj kursoj. Unua kurso, organizita komence de oktobro en la kvartalo Beauregard, ne povis okazi, ĉar nur 1 lernantino anoncis sin... malgraŭ 600 flugfolioj, 30 afiŝoj, 6 komunikoj en la gazetaro kaj 1 ĉe la radio.

Poste, por la 5a de novembro ni anoncis 2 aliajn kursojn en la Centra Junuldomo, per 65 afiŝoj, 1100 stencilitaj kaj 300 presitaj flugfolioj, 6 komunikoj en la gazetaro kaj 1 ĉe la radio. Ok lernantoj aliĝis al la unua kurso (rektmetoda, per Junulkurso), gvidata de F-ino MARCHAL, ĉiumarde je la 18a30. La dua kurso, ankaŭ marde je la 20a30, varbis nur 1 lernantinon. Dank' al la fleksebleco de la metodo "Assimil", uzata por tiu kurso, ni povis per pliaj centoj da flugfolioj, 25 leteroj aŭ cirkuleroj al interesatoj aŭ ekselelernantoj, kaj per pliaj komunikoj en la gazetaro, inciti la publikon lerni sola Esperanton kaj ĉeesti marde vespere en la Junuldomo, laŭpove por praktiki la lingvon... Ĝis nun sen rezultoj.

Ni ankaŭ disponigis en la Junuldomo, por senpaga memservado, provlecionojn de S-r^o RIBOT. La disdono estas efika, t.e.: la publiko amase forprenas la provlecionojn (50 ĝis nun) kune kun pluraj centoj da flugfolioj, sed tamen rezultas ne unu lernanto plia!

- perkoresponda kurso. Tute bremsita de la poŝta striko ĝis la komenco de decembro, tiu kurso nun plene funkcias. Ni sendis ĝis nun 34 komunikojn al la regiona gazetaro kaj 2 al la nacia. Ni povis kontroli la aperon de 14 komunikoj, kiuj alportis pli ol 180 informpetojn kaj 60 aliĝojn al la kurso. Pro aliaj divers-temaj leteroj (pri la Federacio, kaj aliaj) la respondeculo respondis al 300 leteroj en 6 semajnoj ĝis la mezo de januaro, kaj 450 leteroj entute ĝis la mezo de marto.

La kurso funkcias dank' al la kunlaborado de nun 18 korektantoj. Al la listo de kunlaborantoj aperinta en la "Informilo" n^o 8 aldoniĝis S-in^o LOUTERBACH en Echery-Ste-Marie-aux-Mines, kaj S-r^o Jacques LINDAU en Thionville, kiu ek-agis por krei kurson en sia urbo.

Finlernis last-tempe la unuagradan kurson S-r^o Maurice REMY en Luxeuil-les-Bains (70) gvidita de S-r^o BERGEROT, kaj S-in^o Olga BAUMER en Saverne (67) gvidita de S-r^o ZIPFEL.

- radio-elsendo. La sendo de komunikoj al la radio alportis al ni inviton por intervjuo. Ĝi estis elsendita el NANCY, la 18an de novembro, dum la regiona elsendo je la 18a10, dum ĉirkaŭ kvarohoro. Malgraŭ la poŝta striko, ĝi rezultigis 2 leterojn

kaj unu lernantinon.

- kunvenoj. Ni provis daŭrigi niajn vesperajn kunvenojn. Sed la intereso estis malgranda. Nur 3 personoj ĉeestis dum oktobro kaj novembro. Ni ĉesigis tiujn kunvenojn.

- komunaj kunvenoj kun la SAT-rondo. La nancia rondo de Sennacieca Asocio Tutmonda, kiu organizas en la t.n. "Laborrondo" (la Popoluniversitato de Nancy) inter multoj kursoj, ankaŭ esperanto-kursojn, invitis nin al la kunveno kun projekciado de lum-bildoj la 21an de decembro en sia sidejo. La kunveno estis interesa kaj ni ricevis novan inviton por vizito de ekspozicio pri kosmo kaj astronomio la sabaton 1an de februaro, ankaŭ en la Laborrondo. La ekspozicio (en franca lingvo) kaj la komentario tute en esperanto, estis ambaŭ ege interesaj, la neĉeestintoj nur bedaŭru!

Nova kunveno, kun projekciado de diapozitivaj pri Primoŝteno, okazos la 26an de aprilo, je la 16a horo, ankaŭ en la Laborrondo, (1bis rue Drouin, en Nancy).

BALDAŬAJ ESPERANTO-EVENTOJ EN LA ĈIRKAŬAĴO!

- KIAL NE ĈEESTI LA GERMANAN ESPERANTO-KONGRESON? ... Ĝi okazos dum Pentekosto en OBERKIRCH, pitoreska urbeto kun 16000 loĝantoj, kun parte mezepoka urbocentro, je ĉirkaŭ 30 km de Strasbourg, kie la nigra arbaro deklivas al la Rejno. La programo antaŭvidas diskuton publikan, distran vesperon kaj ekspozicion pri la temo "Esperanto-turismo". Okazos diversaj ekskursoj.

Por pliaj informoj kaj aliĝoj, skribu al: ESPERANTO, Lohmlühlweg 1, D 7602 OBERKIRCH

- POR LA VOJAGEMAJ GEJUNULOJ... INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE T.E.J.O. en FREDERICA (Danlando)... de proksima por dinamikaj interesatoj!

Ĝi okazos de la 19a ĝis la 26a de julio 1975. La temo de la kongreso estas "kultura interŝanĝo". Alia celo de la kongreso estas konigi al eksterlandaj gejunuloj Danlandon.

En la programo troviĝas interalie: interkona balo, dana vespero, vespero de malmulte konataj kulturoj, ekskurso, laborgrupoj, seminario "Lingvo kaj malkoloniigo", ktp.

Por pliaj informoj kaj aliĝoj skribu al "Internacia Junulara Kongreso", Østergade 43 DK-7430 IKAST - Danlando.

- EGE GRAVA KULTURA EVENTO ... KOLOKVIO PRI LA LINGVA PROBLEMO EN EUROPO.

Kunlabore kun Sarlanda Esperanto-Ligo la Eŭropa Akademio Otzenhausen, D - 6619, aranĝos la ĉi-supran kolokvion la 21an kaj 22an de septembro 1975.

La dutaga programo antaŭvidas jenajn prelegojn: Prof. D-ro Helmar FRANK (Universitato PADERBORN) pritraktos la temon "Klerigoteknologiaj instrumentoj de eŭropa lingvopolitiko", kaj Prof. LAPENNA (iama Prezidanto de UEA) el la Universitato de LONDONO, "La lingva problemo en la eŭropaj institucioj", Prof. D-ro Max MANGOLD (Universitato de SAARBRUCKEN) prelegos siavice pri "Lingvosciencaj konsideroj pri la lernebleco de la lingvoj de la Eŭropa Komunumo kompare kun la planlingvo ESPERANTO".

Aliĝkotizo de 20 DM (kiu kovros la kostojn por ĉiuj manĝoj kaj la tranoktado) povas jam de nun esti sendata al S.E.L. D - 6601 SCHEIDT Parkweg 14 Germanio.

- RESTADOJ EN GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO

"Fédération Espérantiste du Travail" (FRANCIO) denove organizas restadojn en GDR sub respondeco de la Asocio "Francio-GDR". Ĝi deziras krei grupojn de esperantistoj el okcidentaj landoj meze de turistaj grupoj. Internacia, frata etoso kun laboruloj el diversaj -notinde el socialismaj- landoj. Estos certe taŭga okazo por montri praktike, ke la Lingvo Internacia ne estas utopio, sed vivanta realaĵo.

Dusemajnaj restadoj en Julio kaj Aŭgusto.

Vojaĝo komuna de Parizo al Parizo (trajne aŭ aviadile), aŭ individua laŭvole.

Moderaj prezoj. Aliĝo al "F.E.T." ne postulata.

Tuj skribu al W. GILBERT, 30 rue Croix-Montoire, 37100 TOURS (Fr.) por pli detalaj informoj (Aldonu p.m. de 0,80 FF por Francio - aŭ 1 internacian respond-kuponon por aliaj landoj) Detalajn informojn vi ricevos en ĝusta tempo.

ELĈERPINDAJ NOVAĴOJ ...

NATURAMIKOJ, atentulo!... Kun gesamideanoj el najbaraj regionoj deziras korespondi pri naturamikoj kaj kulturaj aferoj Joh. WINDISCH, D-7426 BONLANDEN - Gartenstr. 10 FRG (proksime de Stuttgart)

NDLR - S-r^o Windisch estas naturamiko kaj serĉas kontakton, pere de esperantistoj kun naturamikoj en Orienta Francio. Li ŝatus renkonti francajn Naturamikojn okaze de ekskurso de Naturamikoj (germanaj) en nia regiono. Li estus tre dankema, se francaj esperantistoj povus faciligi tiajn rilatojn.

Deziras korespondi: A/ 20-jara junulo, germana, en kelkaj leteroj, pri la poezio de Georges BRASSENS. - Skribu al:

Wolfgang KERKHOFF D-6651 ALTSTADT Ortsstraße 7 (FRG)

B/ Deziras korespondi kun juna fraŭlino el Svislando, juna japana studento:

S-r^o Hiroaki MIWA ĉe Yamamura, Segawa 4-20-8 562 MINOO-SI (Japanio)

PLIBONIGO DE LA KASTELO DE GRESILLON. Konstrui ĉambregon por la prelegoj kaj kursoj kun la necesa materialo estas eble ambicia tamen la Kultura Asocio de la Kastelo de GRESILLON povis parte helpi.

Sed nun la Asocio dezirus pagi ĉiujn elspezojn por la plibonigo de la kastelo kaj petas la helpon de la esperantistaro.

Eĉ modesta sumo (minimume 5F) estos bonvena sed kiu povas fari pli estas gratulinda (kaj nepre dankinda!) kaj li akceligo la laborojn.

Sendu la monon al: S-r^o COUSSE Maurice, 11 rue Alain de Rougé, 72300, SABLE-sur-SARTHE, Francio, aŭ ĝirú al poŝtĉeko 2512.77 NANTES.

LA DUA PLEJ VENDATA LIBRO SUR LA ESPERANTISTA MERKATO ĈI-JARE!... (laŭ sciigo de la revuo "ESPERANTO")

Temas pri la valora lego-libro de nia samideano S-r^o LIENHARDT el MULHOUSE, libro kies titolo estas "Amuzaj Dialogoj en Esperanto". Laŭ ĵus ricevita letero de nia kasisisto, restas ankoraŭ kelkaj ekzempleroj en ia hejmo: rapidu mendi ĝin antaŭ baldaŭa elĉerpiĝo! Instruantoj de nia lingvo, tiu verko estas tre valora instruhelpilo.

La libro estas ilustrita de la fama desegnisto ARFOLL...

NIAJ DONACINTOJ

Per ĉi-tiu rubriko ni deziras prezenti al vi niajn malavaraĵajn donacintojn. Ni listigas ilin laŭ la alveno de la donacoj. Ni sumigos ĉiujn donacojn ĝis la fino de la jaro. En nia finjara raporto ni enskribos la finan sumon, kies detalojn vi povas trovi laŭlonge de la jaro en la diversaj numeroj de la INFORMILO.

Jen la unua listo por 1975. Al ĉiuj ni esprimas nian elkoran dankon!

S-ino LAZARUS, 10F - S-r^o BERGEROT, 400F - S-r^o G. BLOESING, 50F - F-in^o JACQUOT, 4F - S-r^o J. BLANKAERT, 4F - Anonima, 50F - S-r^o G. BLOESING, 4F - S-r^o Jean FRANCOIS, 4F - S-r^o Géo JUNIÉR, 4F - S-r^o W. KOBELT, 4F - S-r^o P. HENRY, 30F - S-in^o G. DEGRELLE, 35F - S-r^o RADAM, 4F - Profito el libro-vendado de F-in^o KIRTZ dum la kongreso, 10F - Sumo: 621F.

SPECIALE ATENTINDA... Ĉu vi forgesis?...

...reboni "La Informilon" por 1975? Versajne vi ŝatus ĝin daŭre ricevi. Se vi ne jam pagis vian abonon por 1975, ni petas vin fari tion plej urĝe, eventuale kune kun la kotizo al UFE kaj UEA.

Ĉi-tiu numero estas la lasta, kiun vi ricevis, se vi testas inter la nepagantoj.

Ni atentigas vin pri eta ŝanĝo ĉe nia pĉk. numero: ĝi nun tekstas jene:

FEDERATION CULTURELLE DE L'EST pour L'ESPERANTO CCP NANCY 1997 72 W

PSST!... PSST!... parolas la redaktoro.

Mi intencas doni al vi nur kelkajn detalojn pri la kondiĉoj, laŭ kiuj la bulteno estas redaktata kaj eldonata.

Ĉar la esperantista grupo de BAR-le-DUC estas aktiva asocio-membro de la t.n. Asocio "Action Culturelle du Barrois", kies celoj estas esence helpi la lokajn kulturajn grupojn, ni rajtas peti de tiu Asocio iun ajn servon en la kadro de la ĉi-supra regularo.

Oni do konsentis presi nian bultenon, kvankam ĝi estas ne pure loka sed federacia. Sed vi bonvolu priatenti la fakton, ke la deĵorantino, kiu teknike okupiĝas pri tajpadado, tute ne scipovas la lingvon. Tio signifas, ke okazas kelkfoje preserarojn spite mian klopodon, kaj plue ke mi propramane devas prizorgi la tajpadon kvankam mi ne estas spertisto.

Due "La Informilo" - eldonado estas inkluzivita en serio da eldonaĵoj, kaj sekve ni devas obei al severa eldonplano proponata de la sekretari-ofico kaj okazas ankaŭ, ke lastminutaj urĝaj eldonendaĵoj prokrastigas la aperon de nia bulteno, aperon, kiun oni taksas certgrade malpli necesa ol aliaj asociaj bultenoj.

Per tiuj sciigoj, mi supozas, ke vi eble pli bone estos informitaj pri la problemoj ligataj al la apero de nia bulteno.

BONVOLU NOTI: Ĉiujn aperotajn tekstojn por la "Informilo" vi sendu al la redaktoro, P. DENIS, 5 chemin de blamecourt, 55000 BAR-le-DUC.
(por la n° 11, antaŭ la 1a de junio)

KAJ NUN NI DISTRU NIN o o o

SOLVOJ DE LA ENIGMOJ Informilo n°8

SILAB-ENIGMO: tilburo - rialto - alumeto - genuo - etiko - diveni - ĵperito - okro
ekstermi - neono

KRUC-VORTOJ: hor. artefarita - liono - emil - ebro - onu - keĉ - krom - sl - marat -
aorto - rejn - kol - diismo - otu - re - iri - im - onomatopeo.

PIRAMIDO: d - do - dio - diino - difino - fidinto - difinota - fidoninta

VORTO-ĈENO: evakui - kuiri - rigardi - gardisto - stomako - koturno - notario

ABIO-LUDO: krabli - baloto - blenda - elitro - kitina - kripla - lariko - logiko
gotika - tirado - mandat' - panjoj - operoj - trejni - intern' -
galant' - planko - pikilo - kokino

novaj cerbumaĵoj...

NI RIĈIGU NIAN FRANCAN VORTARON!

Kelkaj eminentuloj asertas, ke la franca lingvo povus daŭre ludi la rolon de tutmonda helplingvo kiel en la 18a jarcento...

Kompreneble por ili nia lingvo estas tre facile ellernebla ! Vi protestas? Kial do? Jen ĉi-sube pruvo de tiu facileco: temas pri traduko de la verbo *partir* (*foriri*) sub formo de konjugacio...

Je pars, tu t'en vas, il f... le camp, nous filons, vous décampez, ils déguerpissent.

Je m'esquivais, tu t'éclipsais, il se débinait, nous nous trissions, vous vous barriez, ils s'escarmaient.

J'ai cavale, tu t'es esbigné, il s'est carapaté, nous avons mis les bouts, vous avez pris le large, ils ont mis les voiles,

Je m'étais échappé, tu avais disparu, il avait déménagé, nous avons dérouillé, vous aviez dévissé, ils avaient levé l'ancre

Je fuierai, tu te sauveras, il se tirera, nous démarrerons, vous ferez demi-tour, ils prendront congé.

.../...

Je te quitterais, tu me plaquerais, il nous plancherait, nous les laisserions choir
vous les laisseriez tomber, ils nous abandonneraient

Décaville! Caltons! Décrochez-vous!

Il faut que je vous lâche, que tu t'absentes, qu'il s'éloigne, que nous nous écar-
tions, que vous vous sépariez, qu'ils s'évanouissent.

Il fallait que je m'évaporasse, que tu te volatilises, qu'il jouât la fille de
l'air, que nous filassions à l'anglaise, que vous vous déguisassiez en courant d'air...

... kaj vivu la tutmonda franca lingvo!

silab-enigmo *

ab - an - an - at - de - e - eg - fio - fo - fo - i - ik - ito - is - k +
ko - ks - le - nt - o - o - o - on - or - pi - r - ra - rm - ro - ro - rt - se - ta
to - ur - va

el la ĉi-supraj silaboj alfabete ordigitaj, vi konstruu vortojn laŭ la ĉi-subaj
donitaj difinoj. la UNUA kaj KVARA literoj de ĉiu vorto, legataj de supre malsupren,
elformas titolon de fama konata humura verko.

- + - - + - - - - arbedo daŭrefolia k. ruĝecaj floroj
- + - - + - - kortobirdo
- + - - + - - sekreciata de abeloj
- + - - + - - - - surskribo sur tombostono
- + - - + - - ridaĉi kun malico
- + - - + - - - - - - inflamo de la haŭto
- + - - + - - - - - - - - arto komponi baletojn
- + - - + - - sen ĝi ne povas vivi "La Informilo"
- + - - + - - - - kruela turmento
- + - - + - - antikva botelago

stranga vizitkarto *

S-RO KURT TUTELI


Jen la vizit-karto de iu samideano.

Pere de ĉiuj literoj de tiu vizit-karto (13), vi ek-
trovu la profesion de la posedanto.

Forigante la literon l, vi divenu pere de la restantaj
literoj (12):

- a/ la italan urbon, kie li vivas
- b/ la finnan urbon, kie naskiĝis lia
edzino.

magia mozaiko ? (KONKURSO)



| | | |
|------|------|------|
| A 5 | J 5 | S 15 |
| B 4 | Ĵ 26 | T 20 |
| C 6 | K 7 | U 18 |
| D 9 | L 2 | V 21 |
| E 3 | M 0 | Z 25 |
| F 14 | N 20 | |
| G 8 | O 1 | |
| H 22 | P 4 | |
| I 8 | R 11 | |

Vi plenigu tiun mozaikon per
la alfabetliteroj, tiamaniere,
ke vi atingu la plej altan su-
mon da poentoj laŭ la valoro
donita.

La gajnonto ricevos libron de
S. BAKO: "Tiaj ni estas" -
Rakontoj - 252 paĝoj
(Vian solvon vi sendu al la
redaktoro) ĝustigante la sumon
de viaj poentoj.